


# SUDFRANCIJA STELO



Bulteno de la Federacio Langvedoko-Rusiljono  
N° 130-3a kvaronjaro 1994- Jarabono 30F al

Fédération d'Espéranto du Languedoc-Roussillon CCP 956-28P Montpellier



La 79a Universalala Kongreso okazis en Julio en Seulo (Koreio). Aliĝis 1776 personoj el 66 landoj, inter ili multaj Azianoj... kaj kelkaj esperantistoj el nia regiono. (legu la raporton pri la evento en SFS 131)

La venontaj Universalaj kongresoj okazos en 1995 en Tampere (Finnlando) -detaloj p.14 en 1996 en Prago (Ĉekio) kaj en 1997 en Aŭstralio.



Je Pentekosto 95 pluraj landaj asocioj kongresos en Parizo: Britio, Francio, Germanio, Italio ... kaj la Eŭropa Unio. Legu la p.10 kaj aligu frue!

La Jubilea (50a) kongreso de Sat-Amikaro disvolviĝos je Pasko en Mittelwihr (Alzaco).



Jam notu, ke la federacia kongreso disvolviĝos en LUNEL la 13an kaj 14an de Majo 1995!

**Esperanto estas ĉies afero.**

La "ago-tago" por Esperanto estis la 8a de Oktobro... Ĉu vi "agis"? Se ne, preparu vin por 1995! La "ago-tago" estos denove en Oktobro; se vi bezonas konsilojn aŭ ideojn, vidu p.11.



## FEDERACIA KUNVENO de la 25a de Septembro en Béziers :

Partoprenis 18 personoj, el la 17 komitatanoj nur 9 (se pluraj senkulpiĝis, aliaj ne montris vivosignon...) ; la kunveno disvolviĝis en salono de "Colonie espagnole". Post bonvenigaj vortoj de la prezidanto, estas proponata tagordo : bilanco de la lasta jaro, bilanco de la nacia kongreso en Agde, diversajtoj, renovigo de la komitato, planoj. Pri la okazintaĵoj la bulteno jam raportis detale. Aldonindas la 20a internacia semajno de Sète (vidu la apartan raporton), kiu denove bonsukcesis dank'al la bona organizado de la grupo de Montpellier kaj Yvette Vierne kaj la forumoj de la asocioj en Montpellier kaj Béziers. Malgraŭ anonco en la bulteno pri tiu unika ebleco varbi, ne venis proponoj por partopreni aliajn forumojn (krom en Agde la 15an de Oktobro). Jean Hénin alvokas por pli regulaj rilatoj inter la grupoj. Jeanine Bony proponas renkontiĝon ĉiutrimestre, ekzemple por komuna manĝo. JH sugestas venigi homojn de aliaj grupoj por prelego, projekcio, teatroludo. Pluraj prelegvojaĝontoj estas anoncitaj de UFE\*.

La kasistino Lucette Négron detaligas la financon raporton pri 93 (de Januaro ĝis Decembro). La bilanco estas deficita (de pli ol 2000 F) pro la kongreso de Limoux.

Jean-Pierre Peray proponas, ke estu ĉiujare kontrolantoj pri la kontoj. Akceptite.

Detaloj pri la buĝeto ne plu aperos en la bulteno sed komitatanoj ricevos kopion dum la federacia kongreso, same kiel ĉiu interesata federaciano.

Post aprobo de la raportoj, ni diskutis pri la nacia kongreso. Ĝenerale venis favoraj eĥoj kaj pluraj gratulleteroj, inter kiuj unu de Claude Nourmont, la nova prezidantino de UFE. La Junia numero de "Franca Esperantisto" raportis detale. Ĉio ne disvolviĝis kiel planite, kelkaj aferoj eĉ fiaskis, sed perfekteco ne ekzistas. Dankojn denove al la federacianoj, kiuj kontribuis al la sukceso de la kongreso. Ne tro pozitiva estis la reago de politikuloj; ni ankaŭ bedaŭras la nepartoprenon de iuj federacianoj aŭ de "najbaroj".

Pri financoj, dank'al la kongreskomitatanoj, kiuj ne kalkulis ĉiujn elspezojn, la bilanco estos pozitiva. Mankas ankoraŭ kelkaj fakturoj. Subvencio de la Ĝenerala Konsilantaro de Hérault aldoniĝas; la Regiona Konsilantaro promesis 5000 F-an subvencion, ni devas kompletigi la dosieron. Ni dividos la eventualan profiton kun UFE ; ne estos problemo por investi la monon por nova kampanjo en la lernejoj ekzemple.

Diversajtoj: Ago-tago, prelegvojaĝoj, GAE, nova vidbendkurso, libroservo, lastaj elsendoj pri E°.

Komitato: Claude Cayzac, kies mandato finiĝas, ne donis vivosignon; ni devas forstrekii lian nomon. Charles Gérard rezignas ; J.H. dankas lin pro lia plurjara kaj zorga kunlaborado kiel sekretario. Jean Hénin, René Llech-Walter, Annick Tora, Yvette Vierne konsentas rekandidatiĝi. Novaj kandidatoj : Jean-Pierre Peray, Gérard Paing, kiu ĵus finis 5monatan vojagon al Azio kaj Patrick Lassis. Ĉiuj estas elektitaj aŭ reelektitaj. La prezidanto konfirmas sian deziron lasi la postenon al nova homo kun novaj ideoj. Louis Ensuque, vicprezidanto, rifuzas pro diversaj okupoj. Jeanine Bony konsentas sekretarii\*\*. Lucette Négron restas kasistino.

Planoj : A. Tora informas, ke la libreto de P. Janton ne estis sendita al la liceoj de Aude. Prioritate ni solvos tiun problemon. Poste ni kalkulos la nombron de kolegioj en la regiono, kiuj deziras ricevi la broŝuron de BT pri esperanto.

En 1995 ni kongresos denove printempe, ĉifoje en Lunel (datoj en Majo konfirmotaj). Fine de nia kunveno S-ino Marie Tuora, konata ĵurnalistino de "La Marseillaise", venis kaj faris al la esperantistoj diversajn demandojn pri la libro de Piron, esperanto, ktp. Ni kune tagmanĝis en "Hôtel de France" kaj rendezuis ĝis baldaŭ.

J.H. (laŭmemore)

\*venontaj prelegvojaĝoj : en Oktobro, Istvan Kabok pri Madjaroj en Vojvodino (YU), en Novembro, Wang Xigen el Ĉinio (kun 4 neesperantistaj samlandanoj) pri arto, poste ~~dum printempo~~ <sup>en Februaro-Marto</sup> Nina Korjenevskaia pri la rusa pentroarto.

\*\* Adreso de nia nova afabla sekretariino: Jeanine Bony,

Résidence Prés d'Arènes C36  
247, Rue F. de Lesseps 34000 Montpellier

MIEUX COMMUNIQUER

# Voyage en Esperantujo

Le congrès annuel de la Fédération d'Esperanto du Languedoc-Roussillon a eu lieu à Béziers. A l'heure de l'après-midi, on a échangé les idées.

**A**NIMÉE par Jean Hé-  
nin, président de la Fé-  
dération d'Esperanto  
du Languedoc-Roussillon,  
une discussion à bâtons  
rompus s'est déroulée essen-  
tiellement autour de l'inté-  
rêt économique de la langue  
internationale vu sous plu-  
sieurs angles.

"La lutte contre la malnu-  
trition ne coûte que dix dol-  
lars par an et par enfant :  
c'est le prix de vingt sept (!)  
mots d'un document de  
l'Union européenne", écrit  
Claude Piron dans son livre  
fondamental "Le défi des  
langues". Traducteur dans  
des instances internationales  
depuis de nombreuses an-  
nées, Claude Piron a  
commencé l'apprentissage  
des langues par l'esperanto,  
ce qui ne l'a pas empêché  
d'en apprendre d'autres, tel-  
les que l'anglais et le  
chinois.

"C'est vrai, dit Maurice,  
que l'esperanto crée une ou-  
verture vers d'autres langues.  
Depuis que je l'apprends non  
seulement mon regard sur le  
français est devenu plus pro-  
fond, mais j'apprends plus  
facilement le russe, telle-  
ment difficile pour les fran-  
çais..." Et combien de nos  
amis de l'association Bé-  
ziers-Stavropol ont aban-  
donné l'étude du russe et  
passent désormais par tra-  
ducteur dans leur correspon-  
dance avec la ville ju-  
melle car l'idée de l'esper-  
anto ne leur a pas été  
suggérée ?

Jean-Pierre, acteur et en-  
seignant esperantiste pro-  
pose une simple comparai-  
son : "Le nombre de termi-  
naisons verbales est de 157  
en russe, 364 en allemand,  
652 en anglais et, tenez-vous  
bien, 2.225 en français, alors  
qu'en esperanto, comme

vous le savez tous, il n'y en a  
que douze !" Quelqu'un  
saute sur l'occasion pour  
rappeler que "l'apprentis-  
sage de l'allemand demande  
deux mille heures, celui de  
l'anglais mille cinq cents,  
tandis que la langue interna-  
tionale peut être apprise en  
cent cinquante heures, donc  
en gros en huit fois moins de  
temps ! Et dire que l'on hés-  
ite encore à l'enseigner à  
l'école !"

"J'ai participé à de nom-  
breux congrès, témoigne le  
délégué de Montpellier. Je  
me suis souvent aperçu que  
le texte français que j'enten-  
dais ne correspondait pas  
vraiment au texte anglais  
traduit. Par contre, quel  
plaisir dans les congrès de  
l'esperanto où l'on commu-  
nique à tout moment direc-  
tement et sans intermédiaire  
avec chacun des trois mille  
participants !"

Ce plaisir de communi-  
cation directe existe aussi  
dans la correspondance  
avec des amis du monde en-  
tier, dans le fait de pouvoir  
écouter la radio internatio-  
nale, de pouvoir voyager à  
peu de frais... Gérard, habi-  
tant d'Olargues, raconte :  
"Avec ma compagne, nous  
venons de faire un voyage de  
cinq mois. Notre but était de  
participer au congrès univer-  
sel d'esperanto qui s'est tenu  
cette année à Séoul. On a  
économisé, on a averti les es-  
perantistes sur le parcours  
du transsibérien que l'on  
voulait emprunter... Partout  
on nous attendait, on nous  
hébergeait, on nous faisait  
visiter... Enrica, qui ne  
connaissait presque pas l'esper-  
anto en partant, l'a ap-  
pris pendant ce voyage..." Et  
Enrica d'enchaîner, enthousi-  
aste : "Le plus grand plai-



sir pour moi, c'était de dé-  
couvrir sur le répondeur en  
arrivant à la maison un mes-  
sage esperanto venant de  
Krasnoïarsk des amis que  
nous avons beaucoup appré-  
ciés..." En prenant rendez-  
vous avec Enrica et Gérard  
pour parler de leur fantasti-  
que périple dans "L'esper-  
antujo", ce monde sans  
frontières qui est celui des  
esperantistes, nous citerons  
la phrase de Pierre Janton :  
"A l'échelon social les classes  
dirigeantes craignent qu'une  
langue commune puisse ja-  
mais unir les classes diri-  
gées".

Petit retour en arrière -  
en 1921, treize Etats (dont

la Perse, la Colombie, l'Al-  
banie, etc) ont saisi la So-  
ciété des Nations dont le se-  
crétariat a été favorable  
pour que l'on commence à  
enseigner l'esperanto dans  
les écoles du monde entier.  
"Malheureusement, devant  
passer en commission, le  
projet a été carrément tor-  
pillé par les représentants  
des grandes puissances et en  
particulier par le délégué  
français. Les effets de cette  
attitude hostile se font sentir  
encore aujourd'hui", écrit  
Claude Piron.

La prochaine rencontre  
est organisée par le Cercle  
biterrois sur le thème "L'art  
moderne russe". Il s'agit

d'une conférence richement  
illustrée des diapositives par  
une éminente spécialiste  
russe, M<sup>me</sup> Korbenievskala.  
La conférence sera traduite  
en français. Elle aura lieu le  
12 novembre. Pour rensei-  
gnements on peut télépho-  
ner au 67.31.13.18.

Marie TUORA

Pour en savoir plus, on  
consultera avec profit : BTJ  
n° 355, 5 novembre 1991.  
Comment communiquer ? (La  
barrière des langues) BT2,  
n° 257, mai 1993. Esperanto,  
une langue sans frontières.  
L'esperanto, Pierre Janton, éd.  
Que sais-je ? Le défi des lan-  
gues (du gâchis au bon sens)  
Claude Piron éd. Harmattan  
1994. 3615 Esperanto, au Mi-  
nitel.

Kiam tiu-ĉi bulteno estis preta kun 14 paĝoj (ne pli pro la kostoj)... kaj la laboro, estis antaŭvidita sur tiu paĝo la dua parto de la historio de nia regiono per poŝtmarkoj. Tiam alvenis du dokumentoj, unu pri la UK de Seulo, alia estis tulpaga artikolo aperinta en "La Marseillaise" pri nia federacia kongreso kaj esperanto. Ni devis elekti kaj vi komprenos la kialon de la elekto; la neelektitaj kontribuoj aperos en la venonta numero Gratulojn denove al "La Marseillaise" kaj Marie Tuora !

## L'importance des frais de traduction

**L**E défi des langues foi-  
sonne de multiples exem-  
ples où les organisations  
internationales ayant dé-  
pensé tout l'argent en tra-  
ductions, refusaient l'aide  
médicale qui était l'objet de  
leur réunion ! Voici un  
exemple tiré du BT2, l'Espe-  
ranto, une langue sans fron-  
tières : "Le 20 mai 1975 de-  
vant les délégués de 145  
Etats participant à l'organi-  
sation mondiale de la santé.  
Sir John Wilson, président  
de l'Organisation mondiale  
contre la cécité, a exposé  
qu'une mise de fonds tout à  
fait raisonnable permettrait  
de sauver la vue de milliers  
de personnes : le traitement

du trachome, principale  
cause de cécité ne coûte que  
2 F par malade. La protec-  
tion contre la xérophtalmie,  
autre maladie pouvant en-  
traîner la cécité : 0,50 F par  
enfant. L'assemblée a écouté  
attentivement cet exposé,  
mais n'a pu mettre en place  
les mesures suggérées, faute  
de crédits.

"Pourtant, huit jours plus  
tard, la même assemblée de-  
vait voter un crédit de 20  
millions pour faire face aux  
dépenses occasionnées par  
l'admission des langues  
chinoise et arabe comme  
langues officielles de travail  
à l'OMS (frais de traduction,

d'impression, de classe-  
ment...).

"A combien d'hommes  
cette somme aurait-elle évité  
de devenir aveugles ?"

Question légitime :  
comment évaluer le coût  
des traductions ?

"Déjà, explique Jean Hé-  
nin, il faut savoir dans  
combien de langues on doit  
communiquer".

Claude Piron rapporte  
dans une de ses premières  
expériences de traduction  
dans une réunion internatio-  
nale où il a fallu, pour  
sept participants, huit tra-  
ducteurs et un technicien.

"Actuellement, on fait un  
calcul mathématique des be-

soins en sachant que, habi-  
tuellement, lors des congrès,  
les traducteurs traduisent  
dans une seule direction,  
donc par exemple un tra-  
ducteur de français en chinois et  
un autre du chinois en fran-  
çais. Donc, lorsqu'il y a trois  
langues dans un congrès,  
combien faut-il d'interprètes ?"

**Souffle coupé**

La salle ne réagit pas im-  
médiatement, surprise peut-  
être par cette façon de voir  
les choses. Pourtant : "C'est  
simple, dit enfin quelqu'un,  
il en faudra six. Donc pour  
neuf langues cela donne

soixante-douze traductions  
et pour douze, cent vingt et  
une..." Souffle coupé, on  
compare ces chiffres au  
nombre de traductions pas-  
sant par une seule langue-  
pont (on traduit tout en Es-  
peranto). La différence est  
impressionnante : pour 9  
langues on fera 17 traduc-  
tions et pour 12, seulement  
23, ce qui donne une idée  
d'économies que l'on pour-  
rait faire. Un document in-  
terne à l'ONU évaluait en  
1980 les frais de traductions  
à 2 F par mot traduit. Il fal-  
lait cent (!) journées de tra-  
vail pour qu'un document de  
25 pages soit disponible  
en 7 langues.

MONTPELLIER :20a Internacia Semajno (Sète, de la 3a ĝis la 10a de Septembro)

45 partoprenantoj - 5 naciecoj.

3 kursoj kun gvidantoj : Pierre BABIN, Stefan MACGILL, Paŭlo GUBBINS

Kuraĝuloj trapasis ekzamenojn : 2 la parolan parton de la Prikapableco,

1 la Ateston pri praktika lernado, 1 la duanivelan ekzamenon de ILEI.

Do fruktodona semajno !

Inter la partoprenantoj 8 "novuloj", kiuj diris, ke ili reklamos pri la venontaj semajnoj kaj estis tre kontentaj pri sia ĉeesto. La "fideluloj", inter kiuj kelkaj

venis por la 15a fojo, ĝojis la reenkontojn kaj la konatajn etoson, lokon...

ĝis la venonta semajno de la 2a ĝis la 9a de septembro 1995.

Dro Yvette Vierne.

*Se vi serĉas idilian lokon por ferisemajno en Esperantio, jam notu la datojn !*

*Menciinde, ke okfoje la jena teksteto aperis en "Midi Libre" en la rubriko "Noté pour vous", inter la 10a kaj 26a de Julio. Dankojn al la gazeto kaj ...al la sekretario Louis Ensuque. Kiu diris, ke mankas informoj pri E°?*

■ Apprendre et se perfectionner dans la langue internationale esperanto et passer d'agréables vacances au bord de la mer Méditerranée, c'est possible, du 3 au 11 septembre, au Lazaret à Sète. Renseignements et informations : Centre culturel esperanto de Montpellier, 5, rue du Docteur-Roux, tél. 67.54.15.43.

FOIRO DE LA ASOCIOJ (la 11an de Septembro)

Homseso zorgis la tutan tagon, ĉu por prepari la budon, ĉu por respondi al demandoj de interesatoj. De la 9a ĝis la 11a horo, ni ne renkontis multe da homoj. Poste, ĝis la 12a horo kaj duono, la "trafiko" estis pli kontentiga, kaj kompreneble, ankoraŭ pli densa post la tagmanĝo ĝis la 19a horo. Entute ni disdonis 135 dokumentarojn, kiuj konsistis el 4 folioj aŭ folieroj:

1) Faldfolio "et si nous parlions E°" kun

unue, ĝenerala prezentado de la Internacia Lingvo, kaj due, regionaj, naciaj kaj internaciaj adresoj.

2) Aparta folio tute loka, titolita "L'espéranto à Montpellier" pri la Montpelli-  
-era Kultura Esperanto-Centro (estraro, adresoj, nomoj, telefonnumeroj, kunve-  
-noj, kursoj kaj staĝoj).

3) Aparta foliero por anonci senpagan iniciadstagon pri Esperanto, kiu okazos por la unua fojo dum la matenoj de sabato la 17a kaj dimanĉo la 18a/9/94. Almenaŭ 5 homoj multe interesiĝis pri tiu baldaŭa staĝo.

4) Faldfolio kun humura desegno : "Un seul remède à la babelite aiguë".

Konklude, ni disdonis iom malpli da dokumentoj ol lastan jaron, sed ŝajnas, ke la babilado kun kelkaj informpetintoj estis pli profunda, pli pasia ĉijare.


Nun, ni esperas, ke venonta semajnfina staĝo akceptos almenaŭ duonduon da homoj.

L. Ensuque.

*Fakte venis 3 homoj. Estas bona ideo tuj starigi staĝon por kontentigi la entuziasmon de kelkaj.*

*La ĉi-supra teksteto montras tion, kion oni povas fari okaze de "foiro de asocioj". La federacio disponas pri materialo kaj homoj, kiuj pretas helpi vin. Se la problemo estas nur financa, kontaktu nin. Ĉiam estas solvo.*

Lastminute: La 22an kaj 23an de Oktobro okazos en Montpellier kolokvo pri la regionaj lingvoj (temo: la regionoj kaj la Eŭropo de lingvoj). Dimanĉon prelegos C. Hagege je la 11a h. pri : kontribuo de regionaj lingvoj al la lernado de vivantaj lingvoj kaj la konstituo de plurlingva Eŭropo. Informas CRDP Tel:67 60 74 66



## NIMES

Pluraj personoj de departemento Gard partoprenis la "Semajnon" de Sète kaj raportis por "Midi Libre". Bona reklamo por E°.

\*\*\*

La 24an de Septembro dudek esperantistoj retrovis sin en Nîmes por la inaŭguro de strato "Doktoro G. Salan". Sur la plato estis la jena indiko: "Rue du Docteur Georges Salan, 1901-1981, résistant, déporté, espérantiste".

Krom la esperantistoj ĉeestis la filino de Dro Salan, delegacioj de la urbdomo kaj de militrezistantoj. La vicurbestro substrekis en sia parolado la gravecon de Esperanto en la vivo de G. Salan. En la sama tago estis inaŭguritaj ok stratoj omaĝe al Rezistantoj.

Post tiu inaŭguro ni veturis al la strato Zamenhof, inaŭgurita en 1968.

J. Amoureux legis al ni tekston en la franca lingvo pri sia amiko G. Salan

\*\*\*

Inaŭguro de la strato Zamenhof en 1968  
("La Praktiko" de Decembro 1968.) ↓

## Espéranto : les Gardois à Sète


■ Le groupe espérantiste de Montpellier a organisé au Lazaret à Sète, un stage d'Espéranto en septembre. Comme chaque année, une cinquantaine d'espérantistes se sont retrouvés au Lazaret de Sète pour une semaine de stage international en espéranto.

Trois niveaux de langue ont permis à tous d'approfondir leurs connaissances de la langue et du mouvement espérantiste, d'échanger des idées et des expériences. M. Paul Gubbins, anglais, récemment primé à Séoul (Corée) pour ses dernières oeuvres théâtrales a enseigné aux débutants par une méthode directe qu'il a lui-même écrite *Kuĵojagŭ* (voyageons ensemble). Sa pédagogie étonnante pour faire découvrir la langue aux débutants permet des progrès prodigieux. M. Stephan MacGill, Néo-Zélandais, qui a enseigné cet été en université à San Francisco, a pris en main un groupe de conversation. Communication de situation, jeux de rôle, littérature enfantine moderne, quizz, quelques devoirs à faire à la plage ou à

l'ombre des pins, tout a été prévu pour tenir l'intérêt des élèves qui sont rentrés enthousiasmés à Bordeaux, Toulouse, en Ariège, à Nîmes, à Montpellier ou en Angleterre. Dans le groupe des espérantophones certifiés, ce fut vingt personnes venues de huit régions de la France et de la communauté européenne. Plusieurs enseignent l'espéranto à Bordeaux, Limoges, Bar-le-Duc, Aix-les-Bains, Nice, Montauban ou Montpellier. Sous la direction de M. Baben, elles ont étudié un roman inachevé de Jean Ribillard édité en 1963: *Vivo kaj opinioj de Majstro M'Saud* (la vie et les opinions de Maître M'Saud).

Si vous pensez qu'une langue internationale véhiculaire, simple mais efficace, qui ne vise pas à supplanter les langues nationales au riche passé culturel et historique, est indispensable dans la communauté européenne et dans le monde, rejoignez le club UNESCO Espéranto, maison de l'Europe, place du château à Nîmes, tous les lundis de 14 h à 17 h.

## NOVA ZAMENHOF-STRATO EN FRANCUJO



(Photo „Midi Libre“)

Nova strato en la sudfranca urbeto Chemin-Bas d'Avignon ricevis, dank' al la klopodoj de ges-roj Volpelière, la nomon RUE ZAMENHOF. La bildo montras la inaŭguran ceremonion; meze staras s-ro Volpelière salutante la kunvenintojn. La regiona gazeto „Midi Libre“ vaste raportis.

## En hommage au Docteur Georges Salan,

à l'occasion de l'inauguration d'une rue portant son nom à Nîmes (le 24 Septembre 1994).

J'ai fait la connaissance du Docteur Salan le 8 Avril 1973, à Alès, où se déroulait le congrès annuel de la Fédération d'Espéranto Languedoc-Roussillon dont j'étais le secrétaire.

A l'issue de la séance de travail le Docteur vint à moi afin de régler la cotisation pour être membre de la Fédération. Ensuite, à pied, nous nous rendîmes ensemble au restaurant où était prévu le repas en commun.

Tout en cheminant dans les rues de la ville, en parfait espéranto, il me parlait de son époque militante espérantiste entre les deux guerres mondiales. Passionné par l'Histoire du mouvement espérantiste, je lui donnais la réplique. Soudain il s'arrêta et me dit : " Comment se fait-il que vous connaissiez tout cela? Vous êtes trop jeune pour avoir connu cette époque". "En effet", répondis-je en ajoutant : "Vous-même avez-vous connu le Docteur Zamenhof?" - "Quelle question! Non, je ne l'ai pas connu" et de lui dire: "N'en avez-vous point entendu parler pour autant ?" Il hocha la tête, me prit par le bras et nous continuâmes le chemin.

Après une mise en retrait volontaire du mouvement espérantiste, le Docteur Salan venait d'enregistrer l'impact psychologique dont il avait besoin tant sur le plan du bain linguistique que sur celui de la mémoire collective. Plus de 35 ans avaient passé et rien n'était figé dans l'oubli !

J'eus l'insigne honneur, sans m'en rendre compte sur le moment, d'avoir été le révélateur de son nouvel engagement espérantiste. Dès ce jour là, malgré la grande différence d'âge, notre amitié devint totale. Quand on a connu le Docteur Salan, on sait ce que cela veut dire.

Il m'écrivait souvent et nous nous rencontrions lors de réunions espérantistes régionales ou nationales.

Répondant à mon invitation, il me rendit visite à Perpignan en 1974. Ce jour là, il m'offrit un des derniers exemplaires qui lui restaient de ses mémoires de Déporté, "Prisons de France et bagnes allemands", publiées et rééditées à Nîmes en 1946. Je lui suggérai aussitôt de traduire son témoignage en espéranto. "Vous n'y pensez pas" me dit-il, "à mon âge et avec autant de lacunes, je ne suis absolument pas en mesure d'entreprendre un tel travail de traduction". Peu de temps après il m'écrivit pour me dire qu'il avait commencé la traduction...

Il s'investit tellement dans la tâche qu'en l'espace de quelques semaines il en avait terminé avec le texte, la correction après frappe et le peaufinage linguistique par deux membres éminents de l'Académie d'Espéranto qui, tous deux, avaient vécu les affres de l'internement pendant la guerre.

Nous étions en 1975, à point nommé pour que cette nouvelle édition sortie des presses d'une imprimerie de Nîmes commémore le 30<sup>e</sup> anniversaire de la Libération des camps de concentration.

La Fidélité dans le Souvenir occupait une grande place dans le coeur du Docteur Salan. L'humanisme était sa Foi et, par l'espéranto, il le portait jusqu'à l'Universel.

Ce n'était pas par simple passe-temps qu'il avait été et était resté profondément espérantiste et je voudrais dire à quel point l'édition espéranto de ses mémoires était le reflet de son double engagement.

Dans un dépouillement profond il a intitulé la version espéranto "la nuda vero", autrement dit "la vérité nue".

Il a donc voulu que son message soit diffusé au sein de la communauté linguistique espérantiste universelle mais, sublime délicatesse, il eut à coeur de supprimer les premiers chapitres de sa narration originale. En effet, dans "la nuda vero" il manque les chapitres relatant les souffrances qui marquèrent le plus sa dignité, ceux décrivant les tortures que lui firent subir et endurer des Français. Ce faisant, la noblesse de l'Idée qu'il se faisait de l'Homme lui faisait porter l'Idée au-dessus de sa propre personne.

L'oubli est la plus lourde des pierres tombales.

C'est pourquoi, en donnant le nom de Docteur Georges Salan à une rue de Nîmes, fort justement une de celles qu'il arpentait quotidiennement, c'est faire revivre sa mémoire et perpétuer son souvenir.

Puisse le passant savoir pour ne pas oublier.

Jean Amoureux.

N.D.L.R.: La plaque porte l'inscription suivante:

"Rue du Docteur Georges SALAN, 1901-1981, résistant, déporté, espérantiste".

**PERPIGNAN :**

Ŝajnas, ke la lingvo-problemo intere-  
-sas la Katalunojn...

Bone sugestis la uzon de Esperanto, sed  
kelkfoje ni estu singardemaj... En la  
tridekaj jaroj estis vojindikiloj en E°,  
nun ne pli. Se vortoj kiel urbocentro,  
hospitalo, katedralo, kastelo estas  
kompreneblaj de multaj homoj, ne  
estas same pri preĝejo, veturiloj, ktp.  
Jean Amoureux informigis ĉe la  
poŝtestro de Perpignan, Rue Docteur  
Zamenhof (!) pri la ebleco uzi longan  
stampon dulingvan kiel en Chambéry.

La respondo estas, ke devas temi pri kultura manifestacio kun neprofito celo,  
ke la teksto devas esti en samgrandaj literoj en la du lingvoj (Leŝo Toubon),  
fine ke la kosto estos 2110 F.

"La langue" est un sujet manifestement très sensible! Nous avons, en effet, reçu un courrier impressionnant à la suite d'un écho paru au début de ce mois et concernant le choix des langues pour les panneaux informatifs (lieux et sites historiques etc).

Ultime réaction, celle de M. Raymond Boré, délégué pour Chambéry de l'U.E.A (Association Universelle d'Espéranto): « Pourquoi favoriser l'anglais au détriment des autres langues officielles de l'Europe. De plus, j'aimerais qu'on m'apporte la preuve que le catalan est moins parlé que l'anglais à Perpignan !

Mais, va-t-on me rétorquer, une dizaine de plaques côte à côte en espagnol, grec, italien, néerlandais ou portugais, c'est impossible! Il faut donc trouver une solution équitable ne lésant personne dans son amour propre, neutre dans le vrai sens du terme. Elle existe! C'est la langue internationale "Espéranto" qui a déjà 107 ans derrière elle, sur toute la terre.

Depuis 58 ans, Perpignan honore le créateur de cette langue par une artère qui porte son nom: "Docteur Zamenhof". C'est tout à l'honneur de la grande cité catalane. »

Ce sympathique lecteur, entre parenthèse défenseur de la langue catalane, qui se propose de remplacer l'anglais par l'Espéranto, devrait cependant s'interroger sur le nombre de personnes qui, dans les P.O ou ailleurs, parle et comprend cette langue internationale...

**E**UROPE: ..... un marché  
**CU**: ..... une monnaie  
**SPERANTO**: une langue

**ESPERANTO**  
MI ESTAS DULINGVA  
je suis bilingue  
**KAJ VI ?**  
et vous ?

CHAMBERY CTA 30-9-94



*Belaspektas kaj bone informas  
tiu poŝtkarto, sendita de Chambéry  
je la lasta uzotago de la stampo pri E°.*

***Lastminute:** La "longa stampo" estos uzata en Perpignan dum tri monatoj ekde Decembro (esperata unua uzotago estos la 15a de Decembro, Zamenhof-tago). Jean Amoureux volontes peros la enpoŝtigon de leteroj aŭ kartoj, sufiĉe afrankitaj kaj adresitaj, kiujn vi sendos al li (en afrankita koverto) por posta poŝta stamp(ig)o. Bona ideo por viaj finjaraj aŭ bondeziraj leteroj. Adreso de Jean Amoureux: 1, Rue de Sorède 66100 Perpignan. Gratulojn al li !*

**LOZERE-AVEYRON:**

Esperantistoj vojaĝis ĉi-somere, ekzemple Ges. Legeay al Koreio, Familio Hénin al Irlando, M. Maurin al Ĉeĥio; ciuj uzis esperanton dum la vojaĝoj. Espereble venos raportoj poste...

"Tago de malfermitaj pordoj" en la MJC de Rodez ebligis varbi du personojn. Prelegvojaĝantoj estas atendataj en la venontaj monatoj: Madjaro, Ĉinoj, Japanino, Rusino.



*Por la unua fojo en la E°-historio aperis telefonkarto kun Esperanta teksto, kun foto de la Sat-kongresejo sur unu flanko kaj reklamo pri esperantista entreprenno sur alia flanko. La ĉeĥa nacia telefona kompanio TELECOM eldonis ĝin en 2500 ekzempleroj.*



*Poŝtkarto ricevita de la UK en Koreio. Dankon !*

## ĈE NIAJ NAJBAROJ :

### Okcidente:

"Esperanto Pyrénées" aperas nun regule kaj plidikiĝis (12 paĝa nun). La abono estas 35 F-a (Edwige Portes, 24, Avenue Halte, 09340 Verniolle/ CEEA pck 2579 34 E Toulouse).

"La Krokodil'", bulteno de la Tuluza E°-centro, eble baldaŭ kuniĝos.

EP de la 4a trimestro 94 raportas pri la kongreso de Agde, longa artikolo aperis en

"Le journal de l'Ariège" sub la titolo : "Un congrès réussi pour Esperanto-France".

La venonta ĥor-staĝo en La Freychède okazos de la 26a de Februaro ĝis la 5a de Marto 95 (gvidos ĝin angla profesia kantisto Sean Osborne). Informas Jorgos 09120 St Félix de Rieutort. Samloke, dum la tria semajno de Majo, disvolviĝos staĝo de la Naturamikoj.

"Asistilo - Hejmoj", bulteno informanta pri la esperantaj komunumoj estas abonebla ĉe Christian Lavarenne, nova adreso: Le Presbytère 09800 Balagué (40F, pck "Asistilo 10421-77 R Marseille). CL provas starigi tie ofsetan presejton kaj fakan bibliotekon pri esperanto (neniun esperantaĵon forjeti sed sendi al la redakcia adreso).

Pri Eŭroka kaj projekto de kompaktdisko vidu apartan artikolon.

### Sude :

Niaj rilatoj kun niaj sudkataluniaj najbaroj iom maldensiĝis kaj ni vane atendis informojn kaj partoprenon en la kongreso de Agde...

Forumo pri lingvoj okazos fine de Oktobro en La Farge, Sant Celoni.

Junulara restadejo en antikva kampara domo bone rekonstruita, meze de arbaro ĉe la bazo de la monto Montseny. Prelegoj sed ankaŭ balo, kaŝtanfesto, fungoserĉado. Kotizoj de 9500 ĝis 13000 pesetoj. Informas: Gemma Armadans kaj Xavier Rodon, Pizarro, 31,5è, 2a E-08302 Mataró.

**4a KEJ-diskutkunveno:  
BABELE BABILI**



*Bunte, amuze,  
fake pri lingvoj*

**29a de oktobro - 1a de novembro  
SANT CELONI (Vallès Oriental)**

### Oriente :

Ni ricevis multajn informojn de la Vaŭkluzaj kaj de la Provenca federacioj. Ni pardon-petas ne aperigi ĉiujn pro la escepte malfrua aperdato de SFS (ekzemple pri la Rodana Rendezuo en Avignon de la 8a kaj 9a de Oktobro).

Laŭvice kelkaj rendezuoj:

- la 5-6an de Novembro : Aŭtuna staĝo en Briançon (kontaktadreso Françoise Noireau, Les Pommiers 14B, Chemin de la Tour 05100 Briançon)
- la 11an de Decembro : Zamenhofa Tago en Avignon
- la 4-5an de Marto 1995: printempa staĝo en Plan d'Aups
- la 29-30an de Aprilo: Provenca kongreso en Carpentras.

Aliĝiloj pri la diversaj renkontoj estas haveblaj de SFS.

"Esperanto-info" (redaktita de nia amiko R. Llorens, Hortensias 2, 121B Bd Napoléon 3 06200 Nice, jarabono 20 F pck R. Llorens 7829 40 L Marseille) estas trimestra dekspaga bulteno en la franca lingvo pri esperanto.

Temas do pri informilo por ne-esperantistoj. Vi trovos en ĝi argumentojn por pledi por la internacia lingvo. Plej bone, abonu kaj donacu ĝin !

*Dans ce bulletin et les suivants vous trouverez de nombreuses possibilités de pratiquer la langue internationale, près de chez vous, dans la région, dans les régions voisines, ou même plus loin. Il y a certainement une rencontre qui vous intéresse, alors prévoyez et participez ! L'opinion de ceux qui nous observent : politiques, journalistes, le public en général, dépend de ce que nous lui présenterons. Un congrès régional n'a pas la même signification si nous sommes trente ou cent, un congrès national si nous sommes cent cinquante ou cinq cents.*

*Pensez-vous faire progresser l'espéranto en restant chez vous? Réagissez-vous quand est diffusée une émission sur l'espéranto (Canal Plus, récemment) ou en rapport avec l'espéranto (comme l'émission de B. Pivot avec Umberto Eco)? Nous attendons vos réactions pour SFS.*





## PARIZO (2-6 junio 1995)

### 2-a ESPERANTO EŬROP-UNIA KONGRESO

**Kongresejo:** "FACULTÉ DE CHIRURGIE DENTAIRE" en Montrouge (92)  
tutapude de PARIZO 14\*, metroo "Porte d'Orléans".

### PROVIZORA PROGRAMO

(94/09/18)

#### Vendredon 2-an de junio

- Alveno de la gekongresanoj.
- 12.00 Ekskurso en la pariza regiono por fruaj alvenantoj.
- Posttagmeze Akcepto ĉe sidejo "Cerisaie" de Esperanto-France,  
nur por dokumentoj.
- 20.00 Interkona Vespero.

#### Sabaton 3-an de junio

- Tuttago Libroservo kaj Ekspozicioj.
- 9.00 10.00 Apartaj kunvenoj por landaj Asocioj/Estraroj/Komitatoj.  
Prezento de ekspozicioj por la kongresanoj.
- 10.45 Malfermo de la Solena Inaŭguro: FESTPAROLADO.  
Unua kunveno pri la kongresa temo: "NIA EŬROPO,  
ĉu landaj asocioj havu komunan pripolitikan agadon?"
- 12.00/14. Ebleco je libera kunmangado en tre apuda memservejo.
- 14.15 Apartaj kunvenoj por landaj Asocioj.  
Samtempa Prelego.  
Samtempe ebleco je Urbovizito por "duonkongresanoj".
- 16.00 Kunvenoj de la estraroj de la landaj Asocioj.
- 17.30 Kunveno de Eŭropa Esperanto Unio.
- 20.30 Bankedo en centro de Parizo kun verda animado.  
Balo.

#### Dimanĉon 4-an de junio

- 08.30 (se planita de fakuloj: Ekumenaĵo)\*
- 09.30 Malfermo por landaj kunvenoj.
- 09.45 Prelego.  
Sekvo de la apartaj landaj estrarkunvenoj.
- 10.30 Dua kunveno pri la kongresa temo: "NIA EŬROPO,  
ĉu landaj asocioj havu komunan varbad-agadon?"

La kongresejo troviĝos je la landlimo de Parizo en Montrouge  
ene de la fakultato de Denta Kirurgio; ĝi estos trafebla pere  
de parizaj transportrimedoj (metroo + 5minute en buso aŭ  
15minute piede).

La unua pagperiodo finiĝos la 15an de decembro 1994  
(ekzemple por unuopulo: 300F, poste 350F ĝis la 1a de Marto  
kaj poste 400F). Eblas aliĝi por unu tago (120F).  
Hotelĉambroj ekde 120F (en dulita ĉambro kun matenmanĝo  
sed eksterurbe). Eblecoj tendumi, ktp.  
Petu aliĝilon de SFS aŭ de E°-France 4bis, Rue de la Cerisaie  
75004 Paris

#### Dimanĉon 4-an de junio

- 12.30 Komuna fotado
- 14.30 Varieteo (una sesio):  
Distraĵoj, Skeĉoj, Landaj teatreroj.  
Promenadoj en tipaj parizaj kvartaloj.
- 17.00 Komuna renkonto en elektota pariza kvartalo  
por lanĉo de balonoj (postoficiala permeso).
- 20.30 Teatra vespero.
- 23.00 Finvespera promenado sur Grandaj Bulvaroj,  
Champs Blysées, ktp...

#### Lundon 5-an de junio

- 09:30 Daŭrigo de kongresaj laboroj.
- 09:30 Prelego.
- 10.30 Kunveno de Eŭropa Esperanto Unio  
kun la ĝenerala publiko.
- 11.30 Rezulto de la konkurso.
- 12.00 Fermo de la Eŭropa Esperanto Unio kongreso
- Posttagmeze Ekskursoj en Parizo.
- 20.30 Varieteo (dua sesio):  
Distraĵoj, Skeĉoj, Landaj teatreroj.

#### Mardon 6-an de junio

- Tuttagaj Ekskursoj.  
Programita akcepto ĉe la Centro de ESPERANTO-FRANCE  
por alilandaj estraroj kaj komitatanoj.

\* Ne oficiala programero

AGO-TAGO :

Ec se estas tro malfrue por la ago-tago de 1994 (la 8a de Oktobro), jen kelkaj ideoj por alia okazo (iam ajn) aŭ por la ago-tago de 1995. SFS ĉiam informas frue, ĉu ne ?

- organizu budon sur vendoplaco (se permesatas),
- disdonu afiŝojn pri la perkoresponda kurso ĉe la komercistoj,
- organizu kulturan prelegon
- organizu prezenton de la libro de C. Piron\*,
- elektu malgrandan lokon en via regiono, organizu renkontiĝon tie, aŭ ekspozicion pri esperanto (tio povas daŭri pli longe ol 1 tago); tie la lokaj ĵurnaloj raportos, ĉar estos evento -des pli se oni atentigas la gazetaron, ke jes en tiu malgranda loko okazas tio, sed en dekoj da aliaj lokoj en Francio, en centoj da aliaj lokoj tra la mondo, okazas similaj aranĝoj ĝuste je la sama tago

\* pri la libro de C. Piron ("Le défi des langues") kaj tiu de Y. Lassagne-Sicard ("Que vive la langue française et que vive l'espéranto!") GAE (Groupe d'action pour l'espéranto) 123, rue de Royan 16710 St Yrieix Tel 45 95 41 82) proponas deponi unu, du, tri ekzemplerojn, jam pagitajn de vi, ĉe via librovendisto; la librovendisto repagos al vi post vendo (kun kompreneble profito por li). GAE proponas al vi tiujn librojn kun rabato. Kompreneble vi povas konvinki vian librovendiston rekte mendi la librojn.

Pri la libro de C.P.: Eldonejo L'Harmattan, 5, Rue de l'école polytechnique, 75005 Paris  
Pri la libro de Y L-S: ĉe la aŭtoro, 30, Rue Montgolfier 93250 Villemomble.

\*\*\*\*\*

Universala Kongreso en 95 en Tampere, Finnlando :

de la 22a ĝis la 29a de Julio.

Tampere estis fondita en 1779 kaj nombras 400 000 loĝantojn. Gi estas turista urbo, konstruita sur istmo, kiu apartigas du belajn lagojn. La kongresejo estis finkonstruita antaŭ 4 jaroj kaj situas en la urbocentro apud la stacidomo. La temo de la UK omaĝos la 50-jaran jubileon de Unuiĝintaj Nacioj.

La turisma servo de UFE proponas vojaĝon kun restado dum la kongresa semajno kaj postkongresa ekskurso tra Estonio kaj ebleco viziti Sankt-Peterburgon, kunlabore kun esperantistaj asocioj.

Petu informojn kaj kongresaliĝilon de UFE. Atentu, ke unua periodo de la kongreskotizo finiĝas la 31an de Decembro, la dua la 31an de Marto, la tria la 31an de Aprilo.

Ili estas respektive (por membro de UEA): 735, 925 kaj 1110 F.; por kunulo 365,460,555 F.

\*\*\*\*\*

ABONOJ :

Jam estas konataj la prezoj de la abonoj por 95 al diversaj E°-gazetoj kaj E°-revuoj. Ĉar pluraj semajnoj estas necesaj, por ke la abono(j) validu, vi povas jam nun pripensi la aferon:

Aboni amikojn en "nepagipovaj" landoj ankaŭ eblas pere de UFE. Abono al E°-gazeto aŭ revuo estas ideala donaco, ĉar via(j) amiko(j) ricevos la revuon dekdufoje en la jaro kaj la gazeton preskaŭ kvindekfoje...

X Ne forgesu mem reaboni al "Sudfrancia Stelo" (detaloj sur la 1a paĝo), la abono restas 30 F-a; vi povas ankaŭ aboni(gi) geamikojn.

ABONOJ 1995 - Prezoj en francaj frankoj (FRF)

Peradas por vi ESPERANTO FRANCE 4 bis, rue de la Cerisaie 75004  
PARIS. Telefono (1) 42 78 68 86 Telekopiiilo (1) 42 78 08 47

Abonoj validas por la kalendara jaro krom por EL POPOLA CINIO, kies abono povas komenci en iu ajn monato.

Brita Esperantisto - 6 numeroj	
Dia Regno - 12 numeroj	65
El Popola Cinio - 12 numeroj	150
Esperanto (por NE-membro-abonantoj de UEA) - 11 numeroj	190
Esperanto-Actualités (por francaj) pour 5 ans	200
Esperanto-dokumentoj (angle, esperante, aŭ france) 10 num.	
Eventoj (pri la Esperanto-movado) - 24 numeroj	205
Eventoj aerpoŝte	235
Fonto (Literatura revuo) - 12 numeroj	120
Franca Esperantisto (por NE aktivaj UFE-membroj) 11 num.	190
Heroldo de Esperanto (pri la Esperanto-movado) - 16 num.	160
Heroldo aerpoŝte	185
Juna Amiko (interlerneja revuo) - 4 numeroj po 32 paĝoj unu ekzemplero	45
de 2 ĝis 5 ekz je la sama adreso	40

de 6 ĝis 24 ekz je la sama adreso	30
ekde 25 ekz je la sama adreso	25
Kontakto (por ne-UEA membroj) - 6 numeroj	125
Kulturaj Kajeroj (Grésillon) - 4 numeroj	80
La Domo (por fakuloj pri konstruado kaj domloĝantoj) 4 num.	120
La Espero el Koreio - 6 numeroj	
La Kancerkliniko (politika kultura ajnista) - 5 numeroj	125
La Ondo de Esperanto (sociokultura el Ruslando) - 6 num.	75
Lingvaj Problemoj Lingvo Planado - 3 numeroj po 100 p.	
Literatura Foiro (6 numeroj)	170
Litova Stelo - 6 numeroj	
Monato (Internacia magazino) - 12 numeroj	226
Monato aerpoŝte	261
La Jaro (poŝkalendaro de Monato)	30
La Jaro (aerpoŝte)	42
Rok' Gazet' (pri muziko) 2 numeroj jare Abono por 4 num.	100
Ruslanda Esperantisto - 12 numeroj	62
Verda Lupeo/fenikso (filatello) - 4 numeroj	90

Aboni geamikojn el nepagipovaj landoj eblas pere de UFE. Mankantaj abonkotizoj ne trafis nin akurate; ili aperos en posta numero, aŭ haveblas telefone de kiam ni havos.

## Tiom longa vojaĝo...per esperanto...

(Raporto de Gérard Paing, Les Sagnes, 34390 Olargues, pri kvinmonato vojaĝo al Azio, de la 29a de Marto ĝis la 30a de Aŭgusto 1994).

Vojaĝi per ESPERANTO estas eksterordinara maniero por viziti fremdajn landojn kaj renkonti homojn. Alvenante en ĈINION de ULAN-BATORO, ni, de tiu lasta urbo, telefonis al esperantisto de HUUHOT, kies nomo estas en "PASPORTA SERVO". Tiu-ĉi, eĉ se li ne tute bone komprenis nian telefon-interparoladon, atendis nin en flughaveno de HUUHOT. Tuj post la formalizaĵoj, li invitis nin akompani lin ĝis sia hejmo per antaŭrezervita taksio. Tuj li, Sro LI, estis por ni kiel amiko bone konata de longe kaj ĉefe ni tuj povis babilu pri ĉio...

En ĈINIO kompreneble ne estas facile por Eŭropano legi ĉinajn ideogramojn, sed por ni neniuj problemoj: ni havis "senpagan ĉiĉeronon". Jam lia edzino estis preparanta ĉinan manĝaĵon kaj teon, por ni restis nur manĝi bonegan aĵon. Dume ni planis nian restadon en tiu urbo. Laŭ sia opinio, ne rajtanta gastigi hejme, Sro Li nin kondukis al aparta gastejo (hotelo) ne tro multekosta.

Vespere esperantistoj de la klubo feliĉe akompanis nin al restoracio: provu elekti manĝaĵon, kiam menuo estas skribita en la ĉina lingvo!

Sekvantan tagon, ĉiam kun esperantisto, Sro CHEN, ni iris lui biciklon kaj poste, kiel Ĉinoj, ni veturis per biciklo por viziti vidindaĵojn de la urbo kaj magazenoj. Ĝis nia foriro Sro Chen, 77jaraĝa, tre kortuŝa homo, estis nia bicikla gvidanto ĉiun tutan tagon.

Dume, Sro Li, emerita fervojisto, prizorgis niajn trajnajn biletojn al Xi'an kaj organizis kunsidon de la esperanto-klubo. Tie ni povis rakonti nian ĝisnunan vojaĝon kaj interŝanĝi novaĵojn kaj ideojn pri Esperanto kaj la esperantista movado.

Fine "la bukedo"; fabelan inviton por bankedo faris la esperanto-asocio de Huhhot, kiu plie ne akceptis monon de ni: "vi estas niaj gastoj!" La sekvantan tagon, nia foriro de la stacidomo estis kvazaŭ forlaso de malnovaj amikoj...

### 5000 kilometroj tra Rusio sen trafikŝtopiloj!

Nia vojaĝplano, ekiro: MOSKVO.

Reiru al la komenco de tiu-ĉi vojaĝo. Ni, Henryka (Enrika) kaj Gérard (Ĵerar) foriris el hejmo en Francio la 29an de marto 1994. Antaŭe, ni estis skribintaj al kelkaj esperantistoj de "Pasporta Servo" en urboj, kie ni deziris trapasi aŭ halti. Nia plano estis iri al Ĉinio vagonare de Frankfurto en Germanio kaj veturi per la fama trajno "Transsiberia" de MOSKVO ĝis PEKINO. En Moskvo ni estis akceptitaj de rusa amikino, kiu scipovis la francan lingvon. Tamen ni vizitis tiun ĉefurbon kun diversaj lokaj esperantistoj. Estis nia unua esperanta kontakto kaj komence ni ne estis spertaj esperanto-parolantoj. Tamen tiuj vizitoj kun lokuloj estis tre interesaj kaj ni povis nin interkompreni. Ekzemple Sro LEO, malnova moskva esperantisto, montris al ni la diversajn lokojn, kie travivis Dro ZAMENHOF en Moskvo.


SAMARA: Esperante kanti...sed vi devos atendi ĝis la sekvonta numero de SFS!

*Antaŭ la transsiberia trajno staras kaj...kantas la grupo de SAMARA.*

*Enrika estas la tria de dekstre, Ĵerar la kvina de maldekstre.*



## MAZI KAJ LA REĜA FAMILIO SALUTAS VIN!



Konatiĝu kun la tuta "familio". Krom la Reĝo kaj la Reĝino, estas Princino Silvia. Korvaks (la mal-bonulo) estas la reĝ-konsilanto, li pli-malpli lerte uzas komputilojn. Karlo estas la ĝardenisto, li amas la Princinon; ŝi lin amas kaj mal-amas Korvaks, kiu provos sin venĝi. Plej gravas la heroo, Mazi, verda kosma estaĵo, kiu venos en Gondolandon kaj renkontos la tutan familion. Temas pri profesinivela vidbenda kurso, origine kurso de BBC (Muzzy) jam vidita de 2 miliardoj da homoj. La kurso estas jam adaptita en la francan, germanan kaj hispanan lingvojn.

Kvankam la kurso celas infanojn - persone mi povas atesti, ke ĝi multe plaĉas al ili, ĉar mi uzas ĝin en miaj klasoj, ne nur por komencantoj - plenaĝuloj ankaŭ bone amuziĝas rigardante ĝin. Bazaj frazostukturoj koncernas ĉiujn aĝojn. Frazomodeloj, perfekte eldiritaj, estas prezentataj skribe sur la ekrano. La sinkronigo aŭ voĉdublado estas laŭdire perfekta, en ĉio partoprenis aktoroj, la adaptado de la teksto estis farita de Stefan MacGill, didaktikisto konata en nia regiono.

Do, jen serioza ebleco instrui la bazojn de esperanto interese, rapide kaj senpene. Nur restas al la esperantistaro la devo malavare subteni la projekton, por ke ĝi efektiviĝu. Kiel? Antaŭpagante la valoron de 50 dolaroj antaŭ la fino de Decembro al IEF (rabato por mendo de pluraj kompletoj). Laŭdire 500 kompletoj devas esti mendataj antaŭ la jarfino por certigi la aferon. Kompreneble oni liveros nur iom poste; eble la unua vendo okazos dum la kongreso de Tampere.

Adreso de la "Internacia Esperanto-Instituto": Riouwstraat 172, NL 2585 HW Den Haag - Nederlando. telefono kaj fakso: 31.70.3556677.

J.H.

\*\*\*\*\*

### VIDPUNKTO: La aŭtovojo niaprezidanta:

La tiel nomata A.75 "La Méridienne", "ŝtata" kaj SENPAGA aŭtovojo, interkomunikontas tute kaj seninterrompe Clermont-Ferrand kaj Béziers verŝajne en 1998/1999.

Nune ĝi jam elstreĉas de nordo al sudo el la Arverna ĉefurbo ĝis la suda Aumont d'Aubrac-a elirejo. Pli sude la pre-paraj laboroj estas grave antaŭenirigataj ĝis la norda Marvejols-a enirejo. Ankaŭ pli sude jam ekzistas mallonga veturebla peco apud Banassac-La Canourgue, almenaŭ por la sud-norda direkto.

Sinjoro Federacia Prezidanto, jen tio, kion plendas iomaj Lozeranoj: "Multe profitas, ke oni estu Prezidanto. Pli urĝa estas, ke antaŭ ol tiu "prezidanta peco" oni konstruintu la Marvejols-an ĉirkaŭiron. Marvejols de la pasinta somero iom post iom fariĝas terura trafikŝtopada loko, same kiel Montélimar, Grand-Gallargues kaj aliaj". Plie nia Prezidanto havas je sia dispono tute apud La Canourgue rudimentan flughaveneton kaj belan dumotoran aviadileton por vojaĝi al la regiona ĉefurbo kaj reiri (almenaŭ tage kaj tiam, kiam belvetaras).

Por tiu "prezidanta" aŭtovojo pli suden ankaŭ oni jam tratunelis Pas de l'Escalette kaj feliĉe tio devigas la kalumniantojn silenti.

Sed finfine, Sinjoro Prezidanto, kiu estas via antaŭnomo? Ĉu Jean, ĉu Jacques?

En La Viallette, en Aŭgusto 94.

H. V.

Ĉu "afero" en la E<sup>o</sup>-federacio, ĉiun SFS malkaŝas?

Feliĉe la lasta demando rivelas la antaŭnomon de la koncernata.

La unua antaŭnomo atendas de la dua... subvencion por la ekvilibro de la buĝeto de la kongreso de Agde kaj ankaŭ esperas plej baldaŭan finkonstruon de la aŭtoŝoseo ĝis Béziers por pli rapida veturado suden.

## Muzika kulturo

### Muzikstel'oj en la sama disko!

Eldonejo *Vinilkosmo* baldaŭ eldonos muzikkompilaĵon sur kasedo kaj sur kompaktdisko. Pluraj grupoj kiel *Rozmariaj Beboj*, *Bruemaj Najbaroj*, *Amplifiki*, *Vladimir Soroka*, *Kajto*, *Jomart kaj Nataŝa*, *Flávio Fonseca* kaj

*Team'* aŭdiĝos sur la albumo kun multaj aliaj grupoj.

Per antaŭmendo vi povas malpli koste akiri ilin, kaj eĉ helpas la realigon de la eldono! La kompaktdis

ko kostas 98 FRF (poste 120!), la kaseda varianto: 65 FRF (poste 70). Tiuj ĉi prezoj ne inkluzivas la sendokoston. Pagi eblas al la uea-kodo: ROKK-B aŭ per poŝtmandato.

Do, indas antaŭmendi! Adreso:

*Vinilkosmo* ĉe Eŭroka  
F-31450 Donneville, Francio  
el Konkize, aŭgusto/1994.



## TRAŬIVITAJ ANEKDOTOJ :

### En Junio, en Nîmes, dum la kongreso de Esperanto-PTT.

Tiun vesperon fine de Junio, paŝante, mi atendis miajn amikojn sur la trotuaro, kiu randas la Niman arenon. Juna paro preterpasis min kaj alparolis min la juna virino:

-Est-ce-que vous parlez français?

-Oui, bien sûr...kaj krome mi ankaŭ parolas Esperanton.

-Qu'est-ce que vous dites?

-Je dis que je parle aussi l'Espéranto.

-Qu'est-ce que c'est que ça?

-C'est la langue universelle.

-C'est un genre de patois.

-Mais non, c'est une vraie langue

-Y-a-t-il un restaurant dans le quartier?

-Oui, il y en a plein dans les ruelles en face, les tables occupent toute la chaussée.

-Merci. A propos, comment il s'appelle votre patois?

-Esperanto, ĝi estas la universala lingvo

Ambaŭ dek metrojn malproksimiĝis al la urbocentro. Subite la junulino revenis kaj flustris al mi :

"Votre Esperanto, c'est quand même une belle langue !"


Roger Colney

### En Seŭlo, dum la lasta Universala Kongreso.

En restoracio de 5-stela luksejo (la kongresejo), mi mendis tri bierojn, en la angla "3 beers", en la komenco de la manĝo. Post dek minutoj, ni ricevis...tri apartajn kalkulojn ("3 bills"). Feliĉe la akvon oni ne devas peti...

Claude Nourmont

## KRUCVORTOJ



### HORIZONTALE

- I) Senem(a).
- II) Metal(o) / Start(o).
- III) s : Kolornuanco / Pesil(o) aŭ Falĉil(o).
- IV) Papa minac(o).
- V) Duonvoj(o) / Judaso, laŭdire.
- VI) s : Atomstato / Ĉina kaprompaĵ(o) / Ĝ(i) rektigas la kapon.
- VII) Nul(o) / Cirkloj.
- VIII) "Lignovoĉ(o)".
- IX) Element(o) de la fajrilŝtono / La unua vertikale.
- X) Ĉu l(i) ŝiras ĉiun monbileton ?

### VERTIKALE

- 1) Longa radiko, nur vortetoj !
- 2) Kotonaj(o) / Nesimpat(i)e.
- 3) s : Plibeligas la fraŭlinon ! / s : Pseŭdosolvo / Plibeligas la piedojn.
- 4) Land(o) kiu jam travivis pli ol 1001 noktojn / Eble tie oni ludas la duan el la sesa horizontale.
- 5) Saĝisto aŭ saĝulo...
- 6) Tendance / Efektiva rezult(o).
- 7) Por la ludo kiel por la monaĥo.
- 8) Administrant(o) / Malkonsenta.
- 9) Tiel sin orienti certe ne taŭgas / s : Fleksebla tubo.
- 10) Ornamplanto(o).

s : sone

D-ro BERTHONNEAU.

Solvoj de la 129-a

	1	2	3	4	5	6	7	8	9	10
I	i	n	s	t	r	u	m	e	n	t
II	n	a	t	r	i		u	t	e	r
III	t	i	r	a	v	i	r		n	a
IV	e	v	a		e	m	e	r	i	t
V	l	a	t	e	r	a	n	o		e
VI	i		o	m	e	g		d	i	r
VII	g	a	s	i	g		a	r	n	a
VIII	e	ŭ	f	r		s	t	i	f	t
IX	n	t	e		o	l	a	g	e	r
X	t	e	r	p	s	i	k	o	r	a

La venonta numero de Sudfrancia Stelo aperos komence de Januaro 1995. Sendu viajn kontribuojn antaŭ la 27a de Decembro 94 al la kutima adreso: J.Hénin Beauregard, Rte de Montcayroux 48500 La Canourgue Tel: 66 32 86 36.

Ne forgesu renovigi vian abonon al SFS (30F). Vidu la numeron de la pĉk sur la unua paĝo. Pri federaciaj aferoj kontaktu la sekretariojn, kies adreso estas sur la paĝo 2a. Agrablan jarfinon !